


4

1980

**MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903**

**OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA**



**ESPERO
KATOLIKA**

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO
ESPERANTISTA*Honora Prezidanto:*

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B - 3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, 11 cours Léopold, F-54042
Nancy Cedex, Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowice, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki,
J. Gotter, J. Kondor, J. Korytkowski, F. Ruaro,
J. Zielonka

Plenumkomitato:

Aŭstrio: W. Mudrak; *Belgio:* E. Paesmans; *Ĉeĥo-
slovakio:* J. Pastrnakova, M. Šváček; *Francio:* L.
Bourdon; *F.R. Germanio:* B. Eichkorn; *Hispanio:*
M. Casanoves; *Hungario:* E. Stancz; *Italio:* A. Cic-
canti, S. Giacchino, G. Pisoni; *Nederlando:* S.P.
Smits; *Pollando:* J. Korytkowska, J. Kos, B. Sobol;
Svislando: F. Bommer; *Usono:* A. Herschel

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo por 1979:

20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017, I - 00100 Roma Appio (Italio)
tel. (06) 780782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

APRILIO 1980

Sur la kovrilo: la S. Petro-Placo (foto Ansa, afable
liverita de la itala registaro/ Presidenza del Consi-
glio dei Ministri).

Ankaŭ je Pasko, Esperanto ne sonis tie.

ENHAVO

- 47 Kun plena respekto kaj amo (*D. Ma-
gnani*)
- 48 Ekumena Kongreso 1981 en Neder-
lando (*J. Koopmans*)
- 49 Eksiĝo
- 49 Landaj reprezentantoj
- 50 Dumvivaj membroj
- 50 Esperantlingvaj Mesoj
- 51 Legantoj skribas (*J. Korytkowski, S.
Motyka, B. Ostropolski*)
- 52 Ni gratulas
- 52 Ni dankas
- 53 Nia ĉiutago (*P.M. Maliński*)
- 56 Katolika horizonto
- 57 Proponoj (*J. Grabmaier*)
- 58 Pri mestekstoj (*J.Kos*)
- 59 Ni funebras kaj kondolencas
- 59 Papaj preĝintencoj por majoj
- 60 Libroservo
- 61 Renkonto (*F. Gruić*)
- 63 La arto subfosii asocion
- 64 Landaj reprezentantoj de IKUE

Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70% -
lire 600.

Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da
reklamo - 600 liroj.

KUN PLENA RESPEKTO KAJ AMO

P. Magnani sendis al la Papo, 10.4.1980, ĉi tiun leteron (en itala lingvo):

Beatega Patro,

mi volus silenti por respekti Vian silenton pri nia plurfoja peto de kristnaska aŭ paska bondeziro en lingvo esperanto. Sed mi ne povas, ĉar mi estas urĝata kaj antaŭenigata de la amaso de esperantistoj, katolikaj kaj nekatolikaj, kiuj staras malantaŭ mi.

Bonvolu kompreni, amatega Patro, ke ĉi tiu insisto estas nura amo al la homaro, por ke ĝi eksperimentu alian vojon en la interpopola interkompreniĝo, pli proksiman al la spirito de Pentekosto ol al tiu de Babelo; certe ne pro pro kluba ŝatokupo aŭ pro elmontriĝemo.

La pli ol 30 lingvoj uzitaj post la belega paska mesaĝo, kvankam plimultiĝintaj kompare kun Kristnasko, tute ne povas kontentigi la postulojn de la aŭskultantaj popoloj. Via Sankteco, post la latina esprimo « *Surrexit Dominus vere. Alleluja!* », bonvolis, kun patra amo, plenigi la vakuon de la neuzitaj lingvoj per la diro: « *...kaj en ĉiuj aliaj lingvoj!... Se ili ne suprenvenas al lipoj, almenaŭ ili estas kun plena respekto kaj amo en mia koro* ».

Santeco, certe ne por esprimi dubon, sed nur pro la ĝojo de la konfirmo, mi kuraĝas demandi de Vi, ĉu inter la lingvoj prisilentitaj, sed egale respektataj kaj amataj, troviĝas ankaŭ la internacia lingvo Esperanto. Ha! Kiom multe ni ŝatus havi pri tio konkretan pruvon, apoge al nia konvinkiĝo kaj al nia laboro kiel katolikoj engaĝitaj en la internacia esperantomovado!

Kun la konsento de mia amatega Episkopo, Mons. Giovanni Locatelli, kiu, kun amemo kaj helpemo sekvas mian « servon » de internacia prezidanto de la katolikaj esperantistoj, mi povos alproksimiĝi al Via Sankteco, okaze de la Speciala Aŭdienco al la diocezanoj de Rimini 19.4.1980, pri kiu mi jam parolis al Vi en mia letero de 12.3.1980, por humila omaĝo. Se mi povus havi, en tiu cirkonstanco, ankaŭ la ĝojon de kuraĝiga vorto, Beatega Patro, por mi kaj por ĉiuj katolikaj esperantistoj! Ili sentas vin en sia rondo, kaj tiom ili apreas Vian apostolan agemon, ke neniu numero de la monata revuo « *Espero Katolika* » estas sen Via instruo.

Kun la koro plena de espero, mi atendas kun fila ĝojo la renkonton kun la amata Patro. Dezirante obei al la Sankta Patrino Eklezio, mi petas genue Via Apostolan Benon.

Sac. Duilio Magnani

EKUMENA KONGRESO 1981 EN NEDERLANDO

Karaj gefratoj,

En la jarkunvenoj de niaj unuiĝoj en Varna, Bulgario, ni unuanime decidis okazigi komunan ekumenan kongreson unufoje en la tri jaroj; tio, do, signifas, ke ni en 1981 havu tian kongreson.

Ekde 1964 ne plu okazis kristana kongreso en Nederlando, simple ĉar estas ege malfacile trovi taŭgan kongresejon. Tamen, la Ekumena Komitato akceptis ĉi tiun komision serĉi sufiĉe grandan kongresejon, kie ni kune povas loĝi, manĝi kaj kongresi.

Nun mi povas informi vin, ke mi sukcesis trovi tre belan konferencojn en bela, trankvila regiono de nia lando, nome en Oudleusen, kom. Malfsen, apud Zwolle. La centro nomiĝas « *de Bron* », kiu signifas « la Fonto », bela simbola nomo por kristanoj, kiuj deziras trovi unu la alian ĉe la Fonto: la Dia Vorto. La centro estas religia centro, ĝi enhavas diversajn konstruaĵojn, modernajn kaj malnovstilajn, antikvajn farmbienojn kun malnov-nederlandaj malfermitaj fajrejoj, diversajn grandajn kaj malgrandajn salonojn kun pluraj pianoj, por ĥorripetado, por pastoralaj interparoloj, por matenpreĝoj kaj grandan preĝejon, 500 litojn (2-pers. ĉambroj, kiuj povos fariĝi 3 aŭ 4-personaj por familioj, salono por 8 aŭ pluraj junuloj) kaj ĝi ankaŭ havas kampadejon, kie oni povos mem prizorgi la manĝaĵojn aŭ manĝi en la centro mem. Krome, sur la tereno estas du grandaj terasoj kun centoj da seĝoj kaj subĉiela teatro, kiu havas elstaran akustikon kaj donos al pli ol 400 personoj sidlokon.

Kaj kiom kostas tiu unika konferencoj? Tre malmultekosta, ĉar ĝi ne estas komerca entrepreno, nek tro luksa. Nur f. 27,50 plena pensio po tago. Precipe en Nederlando tio estas tre favora. Oni ja havas taskojn kiel kovri la tablon, kaj lavi la manĝilaron poste, sed tio ĵus donas tre belan okazon pli bone koni unu la alian. Pasintan semajnon estis granda grupo de Katolikaj pastroj, la ĉefepiskopo eltiris sian talaron, suprenrulis siajn manikojn kaj komencis lavi...

La centro, kiun mi persone vizitis, situas ĉe la bordo de bela rivero, tute trankvile. Ĝi estas atingebla de Zwolle per intervilaĝa aŭtobuso, sed ankaŭ per trajno de Zwolle al Dalfsen kaj tiam poste per taksibuseto. Estas belaj ekskurseblecoj al pitoreskaj nederlandaj vilaĝoj kaj malnovaj urbetoj, boatekskurso al la polderoj, ĉirkaŭ la malnova Suda Maro kaj tiel plu.

La administranto kaj la direktoro montris grandan intereson por nia internacia kongreso, precipe por grupoj el orienteŭropaj landoj. Ni povos tie fari sufiĉe da propagando inter la aliaj grupoj, kiuj tiam tie troviĝos, inviti ilin ekz. k.t.p.

Estis tre malfacile trovi unu liberan semajnon en 1981. La centro, fakte, estas jam tiam tute plena. Tamen, estas ebleco kongresi tie de lundo ĝis lundo 3-10 aŭgusto sed nepre ne de merkredo ĝis merkredo. La Brazila

kongreso estos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. La direktoro petos al la koncernaj grupoj, ĉu ili povos iom ŝanĝi siajn datojn, por ke ni povu veni de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto.

Mi petas sugestojn por la temo de nia kongreso. Ni devos ĉion tre detale antaŭprepari, la Diservojn, la prelegojn, la preĝojn, la Eŭkaristiojn, la kulturajn programerojn, la ekskursojn, ĉar multaj okuloj estos direktataj al ni.

Jelly Koopmans
Nederlando (KELI)

EKSIĜO

H.J. Kindler havigis al P. Magnani longan kaj detalan leteron, en kiu li diras, interalie, ke li redonas sian oficon de estrarano de IKUE, kaj samtempe de landa reprezentanto por Luksemburgio, dum li restos dumviva simpla membro. La letero tiel konkludas: « Mi petas... kompreni mian decidon... oni parolis kaj skribis jam tro multe pri mi publike. La resto estas afero inter Dio kaj mi ».

Sekve de la ekxiĝo de Kindler kiel estrarano, nun okazas kontaktoj por lia anstataŭigo: laŭvice, la kandidatoj kiuj, siatempe, ricevis plejmulte da voĉoj sed ne estis elektitaj, estas Casanoves (Hispanio), Kòbor (Hungario) kaj Gruic (Jugoslavio).

LANDAJ REPRESENTANTOJ

S-ro V.J. Timmins, ĝisnuna landa reprezentanto de IKUE en Aŭstralio, ekxiĝis el sia posteno pro alta aĝo (88 jaroj!). IKUE sincere dankas pro la ĉiam diligenta perado en tiu fora lando, dum 20 jaroj; menciindas, krome, ke s-ro Timmins neniam petis de IKUE la repagon de siaj poŝtaj kaj transpagaj elspezoj, kiujn li ĉiam pagis el sia propra poŝo.

Nova landa reprezentantino por Aŭstralio iĝis f-ino C.A. Sullivan, 56 Royal Terrace, Hamilton, Queensland 4007, kiun ni varme bonvenigas.

La landa reprezentanto de IKUE en Svislando, s-ro Paul Scherer-Graber, nun havas novan bankan konton (tiu antaŭa, ĉe la Ŝparkaso en St. Gallen, ne plu ekzistas, ĉar la konto de IKUE en Svislando estis likvidita). Svisaj membroj bonvolu pagi laŭ jena indiko: Schweiz. Kath. Esperanto-Verein, Luzerner Kantonalbank en Emmenbrücke, poŝtĉeka konto 60-3852 Luzern.

S-ro H.J. Kindler ekxiĝis kiel landa reprezentanto de IKUE por Luksemburgio. Ĉar en tiu lando ne ekzistas aliaj IKUE-membroj, la posteno de landa reprezentanto vakas.

DUMVIVAJ MEMBROJ

Oni atentigis min, ke en la ĝisnunaj listoj de Dumvivaj Membroj de IKUE estas erare preterlasita la nomo de s-rino A. Judickiene el Litovio (Sovetunio).

Mi pardonpetas pro la senvola preterlaso. Samtempe, tio donas al mi la okazon tuŝi temon, kiu meritas priatenton, nome tiun de Dumvivaj Membroj.

Tre ofte, ja, en la dokumentaro de la Centra Oficejo de IKUE mankas precizaj informoj pri tiuj DM, kiuj, ĝenerale, aliĝis antaŭ multaj jaroj (oni memoru, pri tio, ke la arkivoj de IKUE estis plurfoje perditaj, pro militoj, translokiĝoj, morto de la administristoj, ktp). Pro tio, estus tre bele se la DM mem povus kompletigi tiujn informojn, sciigante, en kiu jaro ili iĝis DM, kaj tra kiu vojo.

Krome, ĉar multaj DM ne donas vivsignon jam de kelkaj jaroj, mi varme petas tiujn membrojn, ke ili bonvolu diri, ĉu ili daŭre havas intereson ricevi nian revuon. Se, en venontaj monatoj, mi ne ricevos tiajn certigojn, mi interrompos la sendadon de la revuo al tiuj, kiuj ne donas vivsignon de pli ol du jaroj.

Antonio De Salvo
Sekretario de IKUE

ESPERANTLINGVAJ MESOJ

● Esperantlingva Meso estas celebrata en Milano, Italio (Preĝejo S. Antonio, str. S. Antonio 5), la trian sabaton de ĉiu monato. *La kanono estas eldirata en itala lingvo.* La celebrado okazas laŭ la aparta loka rito (*ambroza*). La mestekstoj estas ĉiumonate publikigataj en la bulteno de la Katolika Esperanto-Klubo de Milano.

● Ĉiudimanĉe okazas Esperantlingva Meso (escepte de la somera periodo) en la Baziliko honore al S. Prassede en Romo. Celebras ĝin P. Giacinto Jacobitti. *La kanono estas eldirata en itala lingvo.* La uzataj tekstoj estas tiuj siatempe aprobitaj de la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto.

● Meso en Esperanto estas ofte celebrata en la feria centro «Esperantujo», situanta en Cavalcaselle (Verono, nord-orienta Italio). Celebras ĝin P. Felice Ruaro. *La kanono estas eldirata en itala lingvo.*

● « *La viro en la mortotuko* », de la sveda episkopo Sven Dannell (trad. I. Lagerström), traktas novajn sciendajn faktojn pri la mortotuko en Torino, plej kredeble tiu tuko, en kiu la korpo de Jesuo estis envolvita.

La libro, ofsete presita, 78 p., kosta 25 sv. kronojn, je antaŭpago afrankite. Adreso: Förlag Gröna Stjärnan, Landerigatan 7, S-416 70 Göteborg, Svedio, p.ĉ.k. 88451-0.

● Nun mi sufiĉe multe okupiĝas pri sciencaj aferoj, speciale en la lingvistika kaj teologia kampo, interesigante ankaŭ, pli ĝenerale, pri la homa komunikado en Eklezio kaj mondo. Mi volus pliprofundigi miajn esplorojn. Tio estus ligata kun miaj verkoj, speciale kun tiu en franca lingvo. Mi pensas, ke la disvastigo de Esperanto en la francparolantaj landoj povus havi grandan perspektivon, kaj ne nur en tiuj landoj, sed ankaŭ ĉe homoj konantaj francan lingvon, speciale profesoroj, ekleziuloj kaj aliaj aktivuloj. Mi esperas, ke la katolikaj Esperantistoj laboros en ĉi tiu lumo. Laŭ mi, eble estas pli grava afero skribi kaj paroli pri Esperanto en naciaj lingvoj ol en Esperanto mem. Estas grava problemo informi, montri kaj klarigi, ke Esperanto jam eniras en sciencajn kampojn, en Eklezion, en internaciajn interrilatojn. Tradukoj, konferencoj en Universitatoj, Seminarioj, kluboj, simpozioj ktp, montras, ke nia lingvo estas io serioza. En la agado de IKUE oni devus pli multe okupiĝi pri ĉi tiuj aferoj. Tiun ĉi entreprenon ne povas fari unu homo. Devas esti ĝenerala volo kaj agado en tiu ĉi direkto. Laŭ miaj eblecoj mi povus fari ion. Eble mi povos pripensi tiun ĉi agadon kaj esplori tiun ĉi specialaĵon, kunordigante aŭ stimulante, kun helpo de aliaj, la katolikajn Esperantistojn kaj la intenacilingvajn esplorojn.

Koncerne mian nunan agadon, ĉi tie en Lublino, mi instruas la italan, la hispanan kaj Esperanton, kaj mi kunlaboras en la Instituto pri Nederlanda Kulturo. La interesiĝo pri Esperanto kreskas en niaj sciencaj medioj, ankaŭ dank' al la Esperanto-Libraro ĉe la Biblioteko de nia Katolika Universitato (*).

Jerzy Korytkowski, Pollando

(*) Kiel konate, pri ĉi tiu E-libraro aperis, en 1979, ampleksa Decimala Katalogo, aĉetebla ĉe IKUE.

● Mi havas tri sugestojn por revivigi la katolikan Esperanto-movado, kiu ne montras, laŭ mi, sufiĉe da fervoro kaj oferemo:

1) intensiva bonfarado kaj helpado al la malfeliĉuloj (ekz. responde al la alvoko entenata en EK 9/79, « Helpu al lepruloj »);

2) kreo de stipendia fonduso, ĉe IKUE kaj landaj asocioj, por helpi eduki malriĉajn homojn en scienca aŭ metia branĉo, kondiĉe, ke ili ellernu Esperanton kaj estonte laboru por ĝi;

3) mi tre aprecas EK kiel bonan informilon, sed, samtempe, ĝi ankaŭ devus esti bona edukilo de katolikaj Esperantistoj. Ĉar ni ĉiuj tre bezonas daŭran edukadon, speciale sub unu aspekto, kiel fariĝi forta, oferema katolika Esperantisto. Verdire, preskaŭ ĉiu artikolo havas ne nur informan, sed ankaŭ edukan valoron, kiun oni devas trovi kaj diveni, sed nun estas necese okupiĝi pri temoj moralaj kaj askezaj.

Sac. Stefan Motyka, Pollando

● «Fine mi donas vivsignon pri mia daŭra ekzistado sur ĉi tiu planedo. Verdire, mi estas tiel surŝarĝita de taskoj kaj laboroj, ke mi tute ne sukcesas respondi al mia korespondantaro. Rilate E-on kaj IKUE-n: mi tamen klopodis ion fari. Mi faris E-kurson, kvankam ne tro sukcesan: nur ĉirkaŭ ses personoj finis la elementan parton. La kampo de mia sacerdota aŭ paŝtista agado esas ampleksa. La paroĥo, kiun mi estras, estas tro vasta, kaj krome mi funkcias kiel Episkopa Vikario super zono ankoraŭ pli vasta. Do ne restas al mi tro multe da tempo. Kiel Landa Reprezentanto, malmulton mi povas agi. Mia Provinco estas unu el la plej malgrandaj kaj situas en la ekstrema nordo de la lando. Ekzistas nur du aŭ tri vere interesitaj E-istoj...

P. Bruno Ostropolski, Argentino

NI GRATULAS

● «*Caldogno fra arte e storia*» («Caldogno inter arto kaj historio») titoliĝas ampleksa (260-paĝa) libro en itala lingvo, publikigita de nia IKUE-ano Prof. Galdino Pendin (Italio). La volumo, riĉe dokumentita kaj provizita per multaj fotoj kaj mapoj, priskribas la vivon de la urbeto Caldogno apud Viĉenco (nord-orienta Italio) de prahistorio ĝis nia tempo. La libro, kiu aperis sub la patroneco de la loka Komunumo, havas ankaŭ kelkajn partojn en Esperanto: la indekson, kaj la indikojn «Unua eldono: marto 1980» kaj «Presita en Italio».

● Nia IKUE-ano Prof. Stjepan Krĉmar (Szabova ul. 21/2, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio) aperigis volumeton kun titolo «*Tri noveloj*», en traduko de alia IKUE-ano, Prof. Josip Velebit.

● Nia IKUE-ano D-ro Pietro Rizzo, unu en la plej malnovaj esperantistoj en Italio, publikigis libreton titolitan «*Sesdek jaroj*», en kiu, interalie, li prezentas memorojn kaj pensojn pri sia esperantista vivo.

● El la bulteno «*Esperanto en Belgio*» de marto 1980, redaktata de nia IKUE-ano Jan Bovendeerd, ni ĉerpas informojn, kiuj montras la agemon de pluraj membroj de Flandra Esperanto-Ligo, samtempe IKUE-anoj: s-ro Guido Schroyers estis elektita «Beneluksa Ambasadoro de la Internacia Amikeco»; dum simpatia ceremonio en la urbodomo de Kalmthout, okaze de la «Semajno de Internacia Amikeco» 1980, festparolis s-ro E. Symoens; s-ro Frans Luyten prizorgas korespondan Esperanto-kurson por filatelistoj, en filatela gazeto.

● Francisko Simonnet, 40-jara franco, Dumviva Membro de IKUE, nuntempe instruas gramatikon ĉe la Moskva Universitato. En la periodo 1971-1976, li instruis ĉe la Universitato de Sajgono (Vjetnamo).

NI DANKAS

Donacis monon al IKUE:

Hispanio: Musazzi; *Italio*: Casetta, Dall'Acqua A., De Salvo, Magnani, Minnaja N., Munarini, Pennacchietti; *Nederlando*: Duin, Kuipers, Steer.

Donacis esperantaĵojn al IKUE:

Aŭstrio: Mudrak; *F. R. Germanio*: Burkhardt, Kondor; *Italio*: De Salvo, Jacobitti, Pendin.

Al ĉiuj donacintoj, multajn dankojn.

NIA ĈIUTAGO

Vi asertas, ke vi kredas, ĉar vi agnoskas la ekziston de Dio. Tamen ĉi tio estas nivelo de informo, akcepto de sciigo. Tio ankoraŭ ne estas kredo.

Kredi en Dion signifas unue ekkredi al Dio kaj riski la vivon en la Lumo, Honesto, Vero, Neprofitemo. Riski. Ĉar la unua paŝo kontraŭas al vi, al via egoismo. Tamen nur la unua paŝo. Poste vi ekkredos, ĉar vi konvinkigos, ke nur tiamaniere oni povas vivi. Konvinkos vin la feliĉo, kontentiĝo, interna, hela lumo, kiujn vi sentos en vi.

La kredo estas vivo en la lumo.

Kiam lupoj ŝteliris al kabanoj, kiam tempesto furiozis super domoj, niaj prapatroj metis sin sub protekton de Dipatrino, bruligante kandelojn.

Al ni jam ne minacas lupoj. Al ni minacas jam ne lupoj...

Al ni jam ne minacas fulmotondroj. Al ni minacas jam ne fulmotondroj...

En la Kandelfesto ni petu, ke ŝi prenu nin sub sian protekton. Sub la protekton kontraŭ la homoj pli malbonaj ol lupoj, kontraŭ malfeliĉoj pli neatenditaj ol fulmotondro.

Estinte malgranda vi deziris estis fama. Vi ankoraŭ ne konis la kialon, tamen vi kredis, ke oni skribos pri vi en gazetoj grandlitere. Ĉu vi daŭre atendas tion? Jes, ni volas, ke oni rimarku nin, petu, danku, ke oni nin rekonu, estimu.

Troviĝas en la Evangelio multnombro da homoj desegnitaj tre precize. Pri Santa Jozefo ni scias malmulte. Oni registris multe da diroj ne nur de apostoloj, sed ankaŭ de farizeoj, impostistoj, pekulinioj. Ne troviĝas eĉ unu lia vorto. Al neniu falis en la kapon demandi, kion li diris, kia estis lia opinio. Ni eĉ ne scias kiam li mortis. Oni ne rimarkis lin...

Li volis foriri ekkoninte gravedecon de Maria. Li restis pro ordono de anĝelo. Pro ordono de anĝelo li fuĝis en Egiptujon kun Maria kaj Infano. Pro ordono de anĝelo li revenis al Palestino.

Li plenumas la ordonojn, kvankam li ne ĉiam komprenas ilian celon.

Li perlaboras la panon por la Patrino kaj la Filo. Li mortas verŝajne tiam, kiam li ne estas jam necesa, kiam Jesuo estis jam plenaĝa.

Jen la Patrono de tiuj, kiuj ne estas ĉejoj, kiuj restas en ombro, kiuj estas nerimarkataj kiel aero, sed kiel aero necesaj.

Eble vi pereos. Eble, realigante vian vivon laŭ modelo de Jesuo, vi malgajnos. De via neprofitemo elprofitos aliaj; via honesteco restos de neniu rimarkita; neniam vi akiros multe da mono; oni algluos sur vin la fliketon de naiva, malpraktika fantaziulo.

Eble vi pereos. Eble vi malgajnos. Tamen tiel, kiel Li malgajnis, kiel Li pereis.

Estu patrino por ni. Igu nin viaj infanoj. Faru, ke ni scipovu konsenti pri nia sorto, kiel vi en la momento de la Anonco; elporti mizeron, kiel vi, kiam vi naskis en la stalo; akcepti humiligojn, kiel vi devigita forkuri en Egiptujon; serĉi Jesuon kiel vi — en la jerusalema templo; peti Lin kiel vi, kiam mankis vino en Kana Galilea dum nuptofesto; suferi, kiel vi, kiam vi staris apud la kruco de mortanta Filo; preĝi, kiel vi en vespermanĝejo atendante descendon de la S. Spirito.

Ni petas vin: igu nin viaj infanoj. Vi estu por ni Patrino.

Antaŭe vi nepre estu homo kaj nur poste vi povas esti: oficisto, laboristo, instruisto, pastro, kuracisto.

Ĉar kvankam via profesio estas grava, estiminda, ĝi ne superkresku vian homecon. Ĉar, kvankam la institucio, en kiu vi laboras, estas eble granda, grava, sankta — estas malpermesite al vi fariĝi ties instrumento. Observante rigide ĝiajn disponojn vi pereigas homojn — anstataŭ servi al ili. Nenia institucio kapablas demeti vian respondecon pri la homa konduto.

Jetu plejdon sur ŝultron, prenu en manon plaĝo-kostumon, sub akselon libron — sed malseriozan, aŭ pli bone prenu nenian — sur la nazon sunokulvitrojn, sur la kapon ian kovrilon — kaj iru al la plaĝo. Sternu tie la plejdon, falu teren kaj provu ne pensi. Aha, antaŭe enpremu ankoraŭ bastoneton apud la plejdo kaj pendigu sur ĝi blankan viŝtukon. Por signo, ke vi kapitulacas.

Vi scias, ke viaj aferoj restas neplenumitaj, ne ordigitaj, tamen ekde tiu ĉi momento vi ĉesas interesiĝi pri tio. Vi okupiĝos pri tio post la finita libertempo.

Tio ne estos tiel simpla. Ĉar dum unuaj tagoj vi ofte ekscitiĝos: ke ankoraŭ ĉi tio ne estas farita, tio neplenumita, ke ankoraŭ al ĉi tiu oni devas ion diri, al tiu doni, de alia ankoraŭ repreni io. Teniĝu obstine je la plejdo, kaj kiam vi estos ekscitata, rigardu vian flagon kaj rememoru, ke vi kapitulacis.

Eble donos la bona Dio, ke vi ekaŭdos, kiel muĝas la maro kaj arbaro susuras; eble vi rimarkos, ke sur la firmamento fluas nubetoj, ke birdoj kantas kaj verdas la herbo...

Plej multekosta por ĉiu homo estas la tempo. Pri nenio ni tiel tremas, kiel pri nia tempo. Kaj pri nenio mi avaras al homoj tiel, kiel pri la tempo.

Kaj ne ekzistas pli valora donaco, kiun ni povas oferi al alia homo, ol la tempo. Kaj doni la tempon al alia homo signifas aŭskulti lin pacience, kompreni lin, helpi al li — fariĝi partoprenanto en lia vivo.

Kaj, kiel organizado de sia tempo estas mezuro de la homa saĝeco, tiel, donado de sia tempo al alia homo estas mezuro de la amo.

Ni timas la vivan Dion. Kaj pro tio ni lokas Lin ie en malproksima ĉielo, kiel tiun, kiu iam kreis la mondon, starigis la ordon de la naturo, al homoj donis porĉiame paraĝafojn de ŝtonaj tabuloj, kaj nun daŭras en perfekta inercio.

Kaj tamen Li estas la Vivo, la Ekeŝtado, la Agado. Vi povas renkonti Lin sur viaj malfacilaj, ĉiutagaj vojoj, ektuŝi nur per manoj lacigitaj de laboro, ekaŭdi, se vi estas kapabla aŭskulti.

Pli facile estas starigi en angulo idolon, al kiu de tempo al tempo vi ĵetos incens-buleton, antaŭ kiu vi klinos la kapon. Kaj la vero estas jena: pro tio, ke Li estas la Vivo, nur per la vivo vi povas renkonti Lin.

Kristo ne alportis al ni recepton nur por eterna vivo. Li ne venis instrui nin kiamaniere vivi, por esti feliĉa nur post la morto. Pro tio ne reduktu lian instruon al ordono kolekti meritojn por la ĉielo. Ne estas tiel, ke vi nur post la morto povas atingi ĝojon. Ne estas tiel, ke vi nur en la ĉielo povas esti feliĉa.

Ni estas kreitaj por feliĉo. Jesuo Kristo celas instrui nin kiamaniere vivi, por feliĉigi la aliajn kaj mem esti feliĉaj ankaŭ ĉi tie, sur la tero.

La eterna feliĉo estas daŭrigo de tia vivo.

Diru al vi, ke vi volas travivi ĉi tiun jaron kiel la lastan en via vivo. Eĉ ne « kiel »; diru al vi, ke ĝi *estas* la lasta jaro de via vivo. Kaj kiam vi, eble ĉe la fino de tiu ĉi jaro, kun ioma kontenteco diros al mi — kaj eble jam ne al mi — « kaj tamen tiu ĉi jaro ne estis lasta en mia vivo », vi perdos nenion. Ĉar fakte nur tiam oni povas vivi, kiam al sia vivo oni donas ekstremajn dimensiojn. Nur tiam oni povas ĝuste decidi, labori, paroli, pensi. Aldone, mi ne garantias, ke vi venos al mi — aŭ jam ne al mi. Ĉar eblas, ke ĉi tiu jaro estos fakte la lasta en via vivo...

Ni tiel atendas la stelon. Ni tiel rapidas al la betlehema groto. Por ekvidi propraokule, por ekaŭdi propraorele, por ektuŝi propramane. Por konvinkigi, ke tiu silenta, terura firmamento, ke tiu nia homa sorto plena de suferoj, ke ĉio ĉi havas sencon.

Por certigi, ke tio, en kion ni arde deziras kredi, ke tio, por kio ni penas vivi — ne estas iluzio.

Propraokule ekvidi, propraorele ekaŭdi, propramane ektuŝi — la *Signon de nia Espero*.

(Fragmento el ĉarma libreto de P. M. Maliński, titolita: « *Nia Ĉiutago* ». Esperantigis la fragmentojn kiel ankaŭ la tuton — P. Johano Kos, Pollando. Laŭ permeso de la Aŭtoro. La originalo kun aprobo de ekleziaj instancoj — « *Imprimatur* »).

KATOLIKA HORIZONTO

● *«La moderna homo en la industriaĵaj socioj — skribis en paŝtista letero mons. Marti Alanis, episkopo de Seo de Urgel (Hispanio) — ne volas paroli pri la morto. Li preferas forlasi ĉi tiun mondon senbrue, preskaŭ kaŝe. En la pasinteco, kontraŭe, la protagonisto de la morto estis la persono mem de la mortanto. Bona morto egalas al kono kaj akcepto de ĝi, kaj familianoj kaj amikoj taksis sia devo averti la mortanton pri la alproksimiĝo de la morto. Hodiaŭ, ni ofte spertas tute kontraŭan socian sintenon. La malsanulo sciuj nenion pri sia baldaŭa morto. Kuracistoj kaj familianoj ĝin kaŝas per ŝablonaj mensogoj, kaj plilongigas sensencajn terapiojn... La kristano devas alrigardi la morton per la okuloj de la kredo. Kiel diris Pascal, ni konas nin nur pere de Jesuo Kristo, kaj for de Li ni scias nenion pri la vivo kaj pri la morto. Per la morto ni partoprenas en la obeemo de Kristo al la Patro, plenumante misteran sed grandan paŝon al la nova vivo kaj al la releviĝo».*

● La nuntempa loĝantaro de Tajvano/Formozo (Ĉinio) konsistas el multnombraj rasoj, laŭ diversaj lingvoj, kutimoj kaj religioj. Multaj el la loĝantoj havas ĉinan, malajzian, polinezian, filipinan devenon.

La indiĝena loĝantaro, ĉirkaŭ 200.000 homoj, vivas sur la montaroj, kien ĝi rifuĝis je la alveno de la aliaj popoloj.

Ekde 1949 (kiam ili komencis agadi en Tajvano) dominikanaj misiistoj prizorgas kontaktojn kun ĉi tiuj indiĝenoj. En ĉi tiuj jaroj oni konstruis 33 kapelojn, kaj 10.000 indiĝenoj estis baptitaj. Nuntempe 6 dominikanoj, helpate de 6 dominikanaj monaĥinoj, okupiĝas pri ĉi tiu apostola agado.

● La privataj radiaj kaj televidaj stacioj, eksplicite katolikaj aŭ laŭ kristana inspiro, estas en Italio preskaŭ 180, laŭ ankoraŭ nekompleta nombrado prizorgata de Asocio, kiu arigas 60 katolikajn staciojn.

● Hindoj iĝas misiistoj. Du hindaj sacerdotoj, ambaŭ apartenantaj al la Kongregacio de la Dia Vorto (Verbitoj), plenumas sian oficon en la insulo Bali (Indonezio).

Bali estas fortikaĵo de la hindua kulturo, en Lando, kie 88% el la loĝantoj sin deklaras islamanoj. Verbitoj laboras tie ekde 1935. Bali, kune kun la apuda insulo Lombok, konsistigas la diocezon de Dempasar, kun loĝantaro de 3.500.000 homoj, el kiuj nur 8.000 estas katolikaj.

● La libroservo de la Esperanto-Rondo en Vsetin (ĉe s-ro Aleš Berka, Na Vyhlídec 1002, p.s. 28, CS-755.01 Vsetin, Ĉeĥoslovakio) disponas pri 100 diversaj libro-titoloj kaj pri multaj revuoj. Petu liston; afranku filatele. Aĉetante ĉe la Esperanto-Rondo de Vsetin, vi povos helpi superi la valutajn problemojn de niaj ĉeĥoslovakaj IKUE-anoj.

PROPOŬOJ

Karaj amikoj!

Mi volas prezenti ĉi tie du proponojn celante, ke Esperanto povu montriĝi kiel utila afero.

1. Okaze de internaciaj renkontiĝoj de plenkreskuloj aŭ junuloj (ekz. Taizé), metu sin je dispono esperantistoj kiel neoficialaj interpretantoj - ĉe kongresoj plejofte ĉeestas oficialaj interpretistoj.

Kunlaboru ĉiam du esperantistoj, ekz. germano kaj franco, hispano kaj italo. Sur ŝildo portota de ili aŭ ĉirkaŭpendigota, ili publikigu: « Esperanto-lingvoservo. Ĉu vi estas franco kaj volas paroli kun germano? Ni helpos vin. » Aŭ: « Esperanto-lingvoservo. Ĉu vi estas italo kaj volas paroli kun hispano? Ni helpos vin. »

La malavantaĝo de tia interpretado, traduki trifoje anstataŭ dufoje (ekz. germane-esperante-france), estos egaligata per la simpleco de la efektivigo.

Tiel estiĝos grupoj de francoj, kiuj parolos kun germanoj, de hispanoj, kiuj parolos kun italoj, de portugaloj, kiuj parolos kun angloj.

Preter la eblo de duflankaj paroladoj, kiel klarigite, ekzistas ankaŭ la eblo de rond-paroladoj. Ekz. kunsidas angloj, francoj, turkoj, grekoj, germanoj.

Franco diras ion; la franca esperantisto traduku en Esperanton. La ceteraj esperantistoj traduku en siajn landlingvojn.

2. IKUE aranĝu internacian stud-servon (specialan informservon), kiu ne okupiĝu pri aktualaj informoj el la katolika eklezio, sed sin okupu pri nediritaj fon-informoj de la aktualaj problemoj.

Tiel oni povus stimuli la precizajn sciojn de ekleziaj problemoj en diversaj landoj.

La ideo povus esti efektivigota jene:

La stud-centralo pripensu, kiuj problemoj de la eklezio tutmonde ekzistas. Oni prenu destinitan problemon, formulu demandojn tiurilatajn, kaj sendu ilin al la landaj responsuloj. La landaj responsuloj kontaktu fakulojn de sia lando, traduku la respondojn en Esperanton kaj sendu ilin al la studcentralo. La studcentralo verku el la respondoj priskribon de la problemo. Tiu priskribo estu alsendota denove al la landaj responsuloj, por ke ili traduku ĝin en la landlingvon kaj alsendu ĝin al la responsaj organizoj de la eklezio de sia lando. La demandado fariĝu dufoje ĝis trifoje en jaro.

Tiu stud-centralo tutmonda supozeble plej bone estos instalata en Germanio. Estas atendeble ke germanaj administracioj episkopaj kaj katolikaj societoj eble donos kontribuojn.

Karaj amikoj, mi havas la konvinkon, ke Esperanto estas la unika ebla solvo de la lingva problemo. Mi havas ankaŭ la konvinkon, ke la eklezio, se ĝi nur volas, povas akceptigi la enkondukon de Esperanto kiel dua lingvo kaj rimedo de la internacia interkompreniĝo de ĉiuj homoj.

Tial estas la tasko de futuro konvinki la estraron de la eklezio pri la neceso de Esperanto.

Se ni atentigas al la « utileco » de Esperanto, ni povas antaŭeniri etapon de la malfacila vojo.

Kun koraj salutoj

Josef Grabmaier
F. R. Germanio

PRI MESTEKSTOJ

● La teksto de E-Meslibreto, eldonita de IKUE en Romo (1978), havas la plej bonan tradukon, kiun mi iam ajn renkontis. La traduko estas fidela, klara kaj bonstila. Ĝi devas esti enkondukita oficiale, kun malpermeso uzi aliajn tradukojn. Estu fine iu ordo en nia liturgia « agado ».

Tamen nenio en tiu ĉi mondo estas perfekta. Ankaŭ la menciita Meslibreto havas (laŭ mi) iujn mankojn pli malpli grandajn. Mi kuraĝas atentigi Vin pri ili:

1) Latina « fratres » koncernas virojn kaj virinojn. Ni havas belan kaj taŭgan esprimon: gefratoj. Ĝi substrekas ĉeeston de virinoj. Kial ne uzi ĝin?

2) « Gefratoj, ni agnosku niajn pekojn... » (p. 1). Agnoski havas en Esperanto nur pozitivan sencon de: rajtigo, rekonno (PIV, p. 15). Do: agnoski pekojn - sonas laŭ mi ironie. Devas esti: ni konfesu, ni bedaŭru pro, ni pentu pri...

3) Pro mia kulpo? Kial? Konkorde kun originalo sufiĉas: mia kulpo mia kulpo, mia *tre* granda kulpo.

4) Gloro al Dio en la altoj...(p. 3): ...Ĉar Vi sola estas sankta, Vi sola la Sinjoro (la la), Vi sola la Plejaltulo (la la) - pli belsone sen artikolo « la ».

5) Oni devus unuecigi la alvokojn kaj respondojn post legaĵoj (kiel havas latina teksto). Se Vi akceptis: « jen la mistero de la kredo » (p.10) do akceptu ankaŭ: Jen la parolo de Dio, Jen la parolo de la Sinjoro. Ankaŭ la respondoj estu unuecaj; pli facilaj por memoro: Dankon al Dio. Gloro (n) al Vi, Sinjoro. Laŭdo (n) al Vi, Kristo.

6) Mi kredas je unu Dio... (p. 4-5). Oficiala, latina teksto havas: ...kru-cumita *ankaŭ* por ni... adorata kaj *kunglorata*... en la *venonta* mondo...

7) Benata estu, Sinjoro... (p. 6). Latina meslibro havas: Benata Vi estas, ho Sinjoro...

8) Kun humilo kaj pento ni petas... (p. 7). Mia propono: « Akceptu nin, ho Sinjoro, starantajn antaŭ Vi en spirito de humilo kaj pento ktp.

9) La Sinjoro akceptu *el* viaj manoj... Devas esti: *de* viaj manoj.

10) Ni petas do... *por* ke ili fariĝu *por* ni (p. 9). Pli belsone: « por ke ili fariĝu *al* ni... »

11) ...preninte la kalikon... (p. 10). Devas esti: preninte *ankaŭ* la kalikon...

12) P. 10: Ni anoncas Vian morton, Sinjoro, kaj konfesas (dua « ni » estas superflua) Vian resurekton, ĝis Vi revenos en gloro - (aŭ: atendente Vian revenon en gloro).

13) Memorante pri *Via* morto... » (p. 10). Miskompreno! La preĝo estas direktata al Dio, la Patro, ne al la Filo. Laŭ latina teksto devas esti: « Do, memorante pri la morto kaj resurekto de Via Filo, ni oferas al Vi, ho Dio, la panon de vivo kaj la kalikon de savo, dankante, ke vi nin *agnoskis* indaj stari antaŭ Vi kaj servi al Vi » (ne: « servadi »).

14) Sinjoro Jesuo Kristo, ...Filo de Dio vivanta... (p. 14): ...« faru ke mi ĉiam observu *viajn* ordonojn (ne: observu ordonojn).

Estas ĉio, kion mi rimarkis komparante Vian tradukon kun oficiala, latina teksto. Mi pardonpetas, ke mi nepetite « enŝovas la nazon » en tiun ĉi aferon, tamen bona traduko de liturgiaj tekstoj estas ja nia komuna afero kaj zorgo. Tiom da malordo regas sur ĉi tiu kampo! Eĉ vortojn de transsubstancigo iuj esperantigas senzorge! Kompreneble mi ne pensas pri Vi!

P. Jobano Kos, Pollando

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

† Giuseppe Farinella, *Italio*.

Ni memoru lin en niaj preĝoj.

Al la funebranta familio, multajn kondolencojn.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR MAJO

Ĝenerala: por ke la dekretoj de la dua Vatikana Koncilio estu komplete plenumitaj, por nova stimulo al la misio de la Eklezio.

Misia: por ke la kristanoj persekutataj en diversaj zonoj de Afriko atestu pri Kristo meze de nekristanoj, por la evoluo de la kredo.

● Esperanto-festo, kun *kolokvo pri aŭtora kaj eldonista etiko en internacia merkato*, kaj kun recitalo de Danielle Béguin kaj Veselin Damianov, disvolviĝos la 31-an de majo kaj la 1-an de junio en La Chaux-de-Fonds, Svislando, ĉe Kultura Centro Esperantista (Pf 771, Postiers 27).

● Esperanto-filatelajojn aĉetas, vendas kaj interŝanĝas Antonio De Salvo, C.P. 4017, I-00100 Roma Appio, Italio.

LIBROSERVO
NOVAJ PREZOJ EKDE 1.1.1980

1) Kristana Esperantista Jarlibro 1975	500
2) Katolika preĝaro	1.500
3) <i>J. Korytkowski</i> , «Internacia lingvo en Eklezio kaj mondo», 1976	7.000
4) <i>N. Van Doornik</i> , «Francisko el Asizo, Profeto por nia tempo», 1976	6.000
5) <i>S. Riabinin</i> , «S. Francisko - Poeziaĵoj», 1977	5.000
6) <i>W. Miziołek</i> , «Enkonduko al ekumenaj problemoj», 1978	3.000
7) Kristana Esperantista Jarlibro 1978	1.000
8) Esperanta meslibreto, 1978	600
9) Decimala Katalogo de la planlingva literaturo ĉe la Katolika Universitato de Lublino, Pollando», 1979	9.000
10) <i>J. Korytkowski</i> , «La Chiesa e il problema della lingua ausiliare internazionale», 1976	6.000
11) <i>J. Korytkowski</i> , «Ekumenismo kaj internacilingva problemoj», 1973	5.000
12) <i>G. Gárdonyi</i> , «La Sklavoj de Dio», 1972	3.000
13) Biblio, plaste bindita	8.000
14) <i>T. à Kempis</i> , «La imitado de Kristo», 1952	3.500
15) Paŭlo 6-a, «La vojoj de la Eklezio»	2.500
16) <i>R. Follereau</i> , «La libro de la amo»	3.500
17) <i>J. Dobraczyński</i> , «La dia avarulo (P. Maksimiliano Kolbe)», 1979	5.000
18) «Patro, la horo alvenis» (ekumenaj preĝoj)	1.000
19) Koloraj bildkartoj «Himno de la kreitaroj» (10 diversaj)	1.200
20) Preĝo de S. Francisko (sur luksa papero; bildo laŭ specimeno aperinta en EK 5/1978, sed kolora)	600
21) Bindita jarkolekto 1978 de «Espero katolika»	12.000
22) Bindita jarkolekto 1979 de «Espero katolika»	12.000

Ĉiuj prezoj en italaj liroj. Sendkostojn oni aldonas al la supraj prezoj (la italaj poŝtatarifoj estas tre malkaraj). Oni pagas surbaze de fakturo. Pagojn oni faru, prefere, per la poŝta konto 23290000, laŭ adreso: «Centra Oficejo de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma, Italio», aŭ per poŝta mandato; ankaŭ eblas pagi al la landaj reprezentantoj, en ĉiuj landoj, inkluzive de tiuj socialistaj.

Rabato 10% por aĉeto de almenaŭ 20.000 liroj.

Rabato 20% por aĉeto de almenaŭ 40.000 liroj.

RENKONTO

Ŝi estas sinjorino ĉirkaŭ sesdek jarojn aĝa, vivas en iu urbo, kaj mi vidis ŝin lastfoje antaŭ kvin aŭ ses jaroj. Mi rememoras, ke ŝi estas interesa kunparolantino, impresas « emancipite », kaj diras pri si mem, ke ŝi havas sian propran mondkoncepton. Mi sciis, kie ŝi loĝas, kaj la okazo permesis al mi viziti ŝin. Mi intencis diri nur « bonan tagon » kaj « kiel vi fartas? », sed la intencita vizito fariĝis renkonto duhora.

Ŝi sciis, ke mi estas sacerdoto, kaj komencis tuj la konversacion pri la kredo:

« Pardonu min pro tio, kion mi nun diros al vi. Eble vi ofendiĝos, sed mi kaptas la okazon diri al vi, kion mi jam delonge deziris diri al iu sacerdoto ».

« Bonvolu; mi esperas, ke mi eltenos vian atakon ».

« Jen, mi kredas je Dio, sed ne kiel la popolo, kiu venas en la preĝejon. Mi ne komuniĝas nek konfesas min, mi ne kredas je tio ĉi; mi ne vizitas preĝejon, krom je Kristnasko kaj Pasko, kiam oni bele kantas, aŭ okaze de la koncertoj en la preĝejo. Mi tre ŝatas la liturgiajn kantojn, mi mem kantis en la ĥoro, sed mi ĝin forlasis. Tamen mi kredas je Dio. Vidu, mi posedas ĝardenon kaj prilaboras ĝin, mi vidas Dion en ĉiu floro kaj planto, kiuj kreskas en la ĝardeno. Floroj kaj plantoj parolas al mi, ke estas iu en ili, kiu donas, ke ili kresku. Mi ŝatas ankaŭ bestojn, mi havas kelkajn katojn, kaj rigardante ilin mi vidas Dion. Jen mia kredo, ne koleru ĉar mi malkaŝe diris ĝin al vi! ».

« Kial mi kolerus kontraŭ via tiel klara kaj malkaŝa konfeso? Ni restu ĉe la temo, kaj vi permesu al mi diri ion pri mia kredo! ».

« Tre volonte ».

« Mi ankaŭ kredas je Dio, kiu donas, ke la floroj kresku kaj la kato estu tiel bela kaj interesa. Mi kredas, ke ĉi tio estas rebrilo de Dia boneco kaj ĉiopovo. Kaj ankoraŭ pli: mi trovas Dian bonecon kaj forton ĉie en la mondo, sur la Tero, sur la Suno, en la tuta Universo. Sed Dio ne restis kaŝita ie en la planto, aŭ malantaŭ la Suno, aŭ ekster la Universo, tiel, ke ni povu vidi lin nur spure. Li alproksimiĝis al ni fariĝante unu el ni — homo. Tio estas Jesuo, Dio en la homo, Dio kaj homo, Diohomo. Dio en Jesuo alproksimiĝis plej eble al ni. Vi konas la historion de Jesuo el la kredinstruo, ĉi tie mi deziras iomete ripeti. Tiu Jesuo, kiu estas Dio kun ni, vivis kaj mortis samkiel ĉiu homo. Sed li ne restis morta kiel aliaj homoj, li leviĝis per sia Dia forto. Li vivas nun en la gloro kaj promesis, ke ni ankaŭ vivos kun li, se ni kredas je li, je liaj vortoj kaj agoj. Ankoraŭ pli: li diris, ke ni jam ĉi tie estas kun li, se ni aŭskultas liajn vortojn. Li postlasis la signon de sia ĉeesto inter ni, sub la pano kaj vino, en la eŭkaristio, kiun vi ne akceptas, kiel vi mem diris. Li restis inter ni en la komunumo, kiu dimanĉe

kunvenas por preĝi, kanti, penti kaj komuniĝi. Li sendis al ni sian Spiriton, en kiu ni kunvenas kaj kredas. En la sama Spirito de Jesuo ni preĝas "Patronia", la preĝon kiun Jesuo mem instruis al ni. En la Spirito de Jesuo ni trovas fortojn por vivi kaj por venki la malfacilojn en la vivo, dum la malsanoj, en la soleco. Ni kredas, ke la Spirito de Jesuo nin fortigas, ke ni povu vivi kiel homoj kun la homoj. Ĉiuj homoj, kiuj ĉi tiel kredas, nomiĝas ununome Eklezio. La Eklezio de Jesuo ekzistas jam preskaŭ 2000 jarojn kaj daŭros ĝis la fino de la mondo, laŭ la promeso de Jesuo-Dio. Ĉi tio estas resume mia kredo kaj la kredo de la Eklezio ».

« Dankon, via pastra moŝto, pro viaj vortoj. Por diri la veron, mi multe aŭdis kaj legis pri la Eklezio kaj kredo, sed neniu parolis tiel kiel vi. Mi pripensas viajn vortojn. Sed antaŭ ol foriri, vi ricevos ion de mi. Prenu ĉi tiun Biblion, kiun mi legis. Ĝi servos bone al vi ».

« Koran dankon pro via komplezo. Sed ĉu ne estos pli bone donaci la Biblion al iu alia, al iu via konatulo, kiu ĝin ankoraŭ ne havas, sed eble legus ĝin? ».

Ni disiris. Mi estis ĝoja kaj ravita, kaj mi kredas, ke mia kunparolantino samtiel estis ĝoja kaj emociita. La du horoj estis por mi bela travivaĵo, kaj mi kredas, ke la samo estis por ŝi.

*Franjo Gruić, Djakovo
Kroatujo, Jugoslavio*

● La plej simpla kaj sekura maniero por sendi monon al IKUE estas ĝia poŝta konto 23290000 (Centra Oficejo de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma, Italio).

Se poŝta ĝiro ne eblas, oni sendu poŝtan mandaton, laŭ la supra adreso de IKUE.

Se ankaŭ tio ne eblas, oni sendu *italan* bankan ĉekon, pageblan en liroj, *ĝireblan*, laŭ la supra adreso de IKUE. Oni evitu internaciajn bankajn ĉekojn (por kies enkasigo oni elspezas tro altajn sumojn), kaj oni ne sendu ĉekojn en fremdaj valutoj (kiujn oni povas enkasigi nur tre malfacile). Se oni sendas neĝireblajn ĉekojn, oni skribu la nomon aŭ de la Direktoro de la C.O. (Antonio De Salvo), aŭ de la Kasisto (Felice Ruaro), ĉar se oni simple adresas al IKUE la bankoj postulas ampleksan dokumentaron pri la rajto kvitanci nome de IKUE.

Estas akceptataj ankaŭ bankbiletoj, en ĉiuj negoceblaj valutoj (it. liroj; germ. markoj; aŭstr. ŝilingoj; hisp. pesetoj; us., kan. kaj aŭstraliaj dolaroj; portug. eskudoj; jap. enoj; jugosl. dinaroj; britaj kaj irlandaj pundoj; dan., sved. kaj norv. kronoj; grekaj drakmoj; eventuale aliaj, laŭ interkonsento).

Ankaŭ eblas pagi al la landaj reprezentantoj de IKUE, en propra valuto (inkluzive de la socialistaj landoj).

LA ARTO SUBFOSI ASOCION

Jen (laŭ franca filatela bulteno) praktikaj konsiloj pri la plej taŭga maniero detruĝi iun ajn asocion:

1) Neniam vizitu kunvenojn, aŭ alvenu tre malfrue. Precipe ne venu, se la veterkondiĉoj ne estas laŭ via gusto aŭ se vi havas alion por fari.

2) Se hazarde vi partoprenas en la kunvenoj, tre zorge kritiku la agadon de la estraro.

3) Neniam iĝu estrarano: kritiki estas pli facile ol fari. Kompreneble, ne forgesu sciigi, ke vi ĝeniĝis pro tio, ke oni ne nomis vin estrarano.

4) Se la prezidanto petas vian opinion pri iu grava afero, diru, ke vi havas nenion por diri. Post la kunveno, diru al ĉiuj, kion li estus devinta fari.

5) Neniam faru ion ajn. Se la aliaj membroj laboras, protestu, dirante, ke la asocio estas regata de kliko.

6) Neniam aŭskultu tion, kion oni diras al vi, sed poste deklaru, ke oni neniam diras ion al vi.

7) Voĉdonu favore al io, sed poste faru ĝuste la kontraŭon.

8) Dum la kunveno aprobu ĉion, kion oni proponas, sed post la kunveno malaprobu ĉion tre vigle.

9) Profitu kiel eble plej multe de la agado de la asocio, sed zorge evitu iel kunlabori en tiu agado.

10) Se oni postulas, ke vi pagu aliĝkotizon, protestu kontraŭ tia senhonteco, kaj tuj minacu ekŝiĝi.

(tradukis A.D.S.)

● La Esperanto-Grupo Unterkirnach (Josef Schiffer, Fohrenweg 19, D-7731 Unterkirnach, F.R. Germanio, tel. 07721/52323) invitas al «*Flormigrado*» en la valoj de Unterkirnach, situanta en la Nigra Arbaro. Tempo: 21.6.80, de la 9-a ĝis la 20-a horo. Celo: lerni la nomojn de la floroj en Esperanto kaj en la germana.

● S-ro Stan. Majer (CS-78383 Trobelice 46, okres Olomouc, Ĉeĥoslovakio), 60-jara pensiulo, deziras korespondi tutmonde.

● Aperis «*Instrua amuzo*», libro por ĉiu, kiu ŝatas amuzon kaj distron. Mendebila ĉe S. Marček, Hurbanova 4/11, CS-03601 Martin, Ĉeĥoslovakio, aŭ ĉe Daniel Luez, 1 rue Victor Faglain, F-02000 Laon, Francio, poŝta konto Lille 1187-38 H (prezo: 7 rpk, aŭ egalvaloro de 5 germ. markoj).

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 20 svissaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝiĝo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
AR - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

C.A. Sullivan
56 Royal Terrace
Hamilton
Queensland 4007

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrixgasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.k. 105.713
ŝil. 160

Belgio

E. Paesmans
Lange Koepoortstr. 64
B - 2000 Antwerpen
p.k. 000-0414589-11; b. fr. 350

Brazilo

P. Pietro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S.P.

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Aleš Berka
Na Vyhlidec 1002, p.s. 28
CS - 755.01 Vsetin

Francio

P. R. Degrelle
11, cours Léopold
F - 54042 Nancy Cedex
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 52

F. R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D- 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726 - 673, Ludwigshafen
Rhein; gm 24

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
Shanti Ashram, Gandhipuram
Coimbatore 641012

Hispanio

Miguel Martinez
Av. da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 850

Hungario

P. Lajos Köbor
Fő u. 58
H-9365 Dénesfa

Irlando

P. J. O'Reilly
« Monksilver », Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavik

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 28/19956 (UECI) -
lir. 10.000

Japanio

Hatirō Matubara
Namimatu-tyō 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruič
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Djakovo
din. 200

Kanado

P. Proulx
790, 80-ème rue Est
Charlesbourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

Jorge Velásquez G.
Apartado aéreo 51740
Medellín

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Madagaskaro

Roger Randrianeke
BP 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. J. M. Claramunt
Apartado postal 318
Oaxaca, Oax.

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat, 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 25

Norvegio

S. Murak
Semsvn 166, N - 1370 Asker

Nov-Zelando

J. Hamvai
29 Arran St.
Avondale, Auckland 7

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL-59.312 Chocianowiec

Svislando

P. Scherer - Graber
Erlen-Str. 58
CH - 6020 Emmenbrücke/Lu
sv. fr. 20

Schweiz. Kath. Esperanto-Verein,
Luzerner Kantonalbank
en Emmenbrücke
poŝteka konto 60-3852
Luzern

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. J. B. Se Cien Kao
P.O. Box 1269
Taipei 100, Taiwan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

Mark B. Weddell
109 Gulf Boulevard
Indian Rocks Beach
Florida 33535
us. dol. 13

Centra Oficejo

IKUE, via Berni 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000

